


BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 92, Novembro 2017




100-jara datreveno de la Oktobra revolucio 80-jara datreveno de la granda teroro

Karaj samideanoj!

En nunaj tagoj okazas du datrevenoj: 100-jariĝo de la 2-a Rusa Revolucio, kulminon de kiu oni tradicie konsideras la “Grandan Oktobran Revolucion”, kiu okazis la 7-an de novembro laŭ la nuna kalendaro, kaj 80-jara datreveno de la Granda Teroro de 1937-38, kies memoron oni celebras la 30-an de oktobro. Ambaŭ eventoj estas dense ligitaj ankaŭ al la historio de la Esperanto-movado en nia lando: la unua donis gravan impulson por disvastigo de Esperanto en Rusio kaj disfloro de la movado en 1920-aj jaroj, la dua por longa tempo pereigis ĝin, kune kun granda aro de ties elstaraj agantoj por longa tempo.

Ni ne analizu ĉi tie la ligan inter la du eventoj, ĉar pri tio ekzistas kontrastaj opinioj (la stalinaj reprezalioj estis logika sekvo de la revolucio, aŭ estis formo de kontraŭ-revolucio, aŭ estis tragedia devio de vera evoluo, aŭ io alia) – tio estas tasko de historiistoj, sociologoj kaj filozofoj. Ni simple rememoru la grandajn poresperantajn atingojn de la revolucia epoko kaj – kun granda danko kaj kunsento – la viktimojn de la Teroro.

Por vekti pli emociajn memorojn, ni presas ĉi tie la poemon de la plej elstara revolucia esperantlingva poeto de tiu epoko, kiu poste fariĝis unu el multegaj viktimoj de la reprezalioj.



Eŭgeno Miĥaliski

FAJRO KURACAS

Ignis sanat

Antaŭen kaj antaŭen ! Al novaj idealoj !
Al nova viv-konstruo ! Al nova viv-rimed' !
Ni eĉ ne haltu antaŭ kruelaj sangbataloj !
Ni ne kompatu, premu la florojn sur la bed' !

La mondo estas koto. Ni koton abomenas.
Ni volas ĝin forigi per nekutima fort'.
Ni, mondon amegante, ĝin tamen ĉiel penas
Fordoni al la brakoj kaj spiro de la mort'.

En sang' naskiĝos Amo. El fajr' aperos Vero.
Kaj Belo ekradios el post densega fum'.
Post neniĝ' disfloros denove tuta tero.
Post longa prema nokto ekbrilos fine Lum'.

Antaŭen ni, kuraĝe ! Al novaj idealoj !
Al novaj vivrimedoj ! Al nova viv-konstru' !
Ni eĉ ne haltu antaŭ kruelaj sangbataloj,
Ĉar nia savo estas en plena viv-detru'.

*Saratov
la 10an de oktobro 1917*



La Estraro informas

Protokoloj de la kunvenoj de la Estraro de Rusia Esperantista Unio en aŭgusto-oktobro 2017

PROTOKOLO № 1 de la Estrara kunveno

DATO: Poŝeĥonjo (Jaroslavlva provinco), 06. 08. 2017

VOĈDONADO: ĉeesta

Ĉeestis estraranoj: Svetlana Smetanina (Moskvo) – Prezidanto, Nikolaj Gudskov (Moskvo) – Vicprezidanto, Mihail Ĉertilov (Balaŝiĥo), Irina Gonĉarova (Odincovo), Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko), Aleksandr Mitin (Niĵnij-Novgorodo), Vladimir Opletajev (Surguto).

TAGORDO / TEMO

1) Disdivido de taskoj kaj laborkampoj / labordirektoj inter la membroj de la Estraro, elektita de la 29a Konferenco de REU (Poŝeĥonjo, 06.08.2017 – 07.08. 2017).

2) Diversaĵoj.

DECIDOJ

1) Komisii al la estraranoj en la dujara ofica periodo 2017 – 2019 plenumadon de jenaj taskoj kaj labordirektoj:

S. Smetanina – ĝenerala gvidado kaj kunordigado de la agado de la Estraro;

N.Gudskov – ĝenerala gvidado kaj kunordigado de la agado de la Estraro; redaktado de “Bulteno de REU”;

M. Ĉertilov – eksteraj rilatoj ;

I. Gonĉarova – regiona agado;

A. Lebedev – financoj, kasisto;

V. Opletajev – instru-metodika agado;

A. Mitin– registrado de membroj, junulara movado.

2) Komisii al Valentin Seguru (Moskvo) daŭrigi la agadon pri la eternigo de la memoro pri Ludoviko Zamenhof kaj oficialigo de Esperanto-objektoj en Rusio.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Sekretario de la kunsido: V. Opletajev

PROTOKOLO № 2 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 03. 09. 2017

VOĈDONADO: reta

Voĉdonis S. Smetanina N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Organizo de AMO-Seminario por rusiaj esperantistoj.

Estas diskutita la decido de la 29a Konferenco de REU (07. 08. 2017) pri okazigo de AMO-seminario en Rusio.

DECIDOJ

1) *Proponi al UEA (s-ro Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA) organizi en februaro de 2018 en Apudmoskvo AMO-seminaron por rusiaj esperantistoj.*

2) *Difini la temon de la AMO-seminario "Junigo kaj modernigo de la Esperanto-movado en Rusio".*

3) *Komisii al Svetlana Smetanina prepari necesajn aliĝdokumentojn por kandidatigi REU al la AMO-programo kaj ekspedi ilin al UEA.*

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 3 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 09. 09. 2017

VOĈDONADO: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

1) Pridiskuto de la projektoj, proponitaj kaj verkitaj de Aleksandr Lebedev, pri la Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev» kaj de koncerna informa reklama teksto pri la Fonduso.

DECIDOJ

1) *Akcepti la provizoran Regularon de la Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev» kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.*

2) *Aprobi la reklaman informan tekston pri la Fonduso.*

3) *Lanĉi la monkollektadon por la Fonduso surbaze de ĝia provizora Regularo.*

4) *Komisii al Nikolaj Gudskov publikigi la dokumentojn en "Bulteno de REU".*

5) *Komisii al Aleksandr Lebedev publikigi la dokumentojn en dissendolistoj kaj sociaj retoj.*

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 4 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 15. 10. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

1) Nomumo de regionaj kunordigantoj de REU.

Konforme al la artikolo 2 de la Regularo pri la regionaj kunordigantoj de REU, akceptita de la 19-a Konferenco de REU, 2002, laŭ la propono de Irina Gončarova, estrarano respondeca pri la regiona agado, estas proponataj ok kandidatoj, kies konsento pri kunlaboro estas ricevita, por esti regionaj kunordigantoj de REU:

- Ildar Kijamov (Kazano) por Volgia regiono ;
- Pavel Veselov (Tjumeno) por Urala regiono;
- Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko) por Siberia regiono;
- Abdurahman Junusov (Maĥaĉkalao) por Nord-Kaukazia regiono;
- Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko) por Centra regiono;
- Jevgenij Bojĉin (Birobiĝano) por For-Orienta regiono;
- Andrej Rjazancev (Murmansko) por Nord-Okcidenta regiono;
- Irina Gorodeckaja (Novoĉerkassko) por Suda regiono.

DECIDO

Nomumi la proponitajn kandidatojn

Ildar Kijamov (Kazano) por Volgia regiono,

Pavel Veselov (Tjumeno) por Urala regiono,

Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko) por Siberia regiono,

Abdurahman Junusov (Maĥaĉkalao) por Nord-Kaukazia regiono,

Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko) por Centra regiono,

Jevgenij Bojĉin (Birobiĝano) por For-Orienta regiono,

Andrej Rjazancev (Murmansko) por Nord-Okcidenta regiono;

Irina Gorodeckaja (Novoĉerkassko) por Suda regiono

regionaj kunordigantoj de REU kun la komenco de ofitado ekde oktobro 2017.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 5 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 25. 10. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov , M. Ĉertilov, I. Gončarova, A. Lebedev, A. Mitin, V.

Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la kotizoj de REU-membroj por 2018.

DECIDO

Konservi la Kotizregularon de REU de la jaro 2017 kaj plilongigi ĝian validecon por la jaro 2018.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Esperanto, kiel ponto inter Rusio kaj Latin-Ameriko



La komisiono de REU pri eksteraj rilatoj havas celon kontakti neesperantistajn instancojn, sociajn organizojn, universitatojn, ŝtatajn instituciojn k.t.p. por trovi eblojn pri komuna aktivado. Per tio REU montras sin kiel aktiva socia organizaĵo, informas pri Esperanto kaj la Movado, partoprenas en sociutilaj eventoj, trovas novajn adeptojn, financajn rimedojn por komuna aktivado. La ĉefa celo de Esperanto-movado

ĝenerale kaj de REU aparte estas disvastigo kaj popularigo de Esperanto. Agante nur por esperantistaro mem ni ne proksimiĝas al nia ĉefa celo. Nur agante kune kun neesperantistaj organizaĵoj en komunaj projektoj ni popularigas Esperanton kaj venas al la vasta publiko.

Dank'al iniciato de profesoro Iván Deance el Meksikio, REU ekhavis eblon partopreni en la tria internacia konferenco "Rusio kaj Iberameriko en tutmondiĝanta mondo: historio kaj nuntempo", kiu estis organizita en Sankt-Peterburga ŝtata universitato la 2-4-an de oktobro. Bedaŭrinde mem Iván Deance ne povis veni en Rusion, pro la natura kataklismo okazinta en Meksikio, kaj pro mallerteco de la organizantoj de rusia flanko. Tamen la planita sekcio "Esperanto, kiel ponto inter Rusio kaj Latin-Ameriko" bonorde okazis. Anstataŭ meksika profesoro d-ro Iván

Deance la gvidadon de la sekcio faris Dmitrij Ŝevchenko. Flanke de REU estis du prelegantoj: Mikaelo Ĉertilov kaj Mikaelo Bronŝtejn. Bedaŭrinde, la lasta ne povis partopreni fizike. Tamen lia prelego "Kurso de Esperanto surbaze de la fabeloj kun plikomplikiĝantaj tekstoj" estos espereble publikigita en artikolaro de la konferenco, same kiel de aliaj prelegantoj. Mi faris prelegon "Grandaj kulturoj kaj iliaj bezonoj pri komunikado", en kiu mi uzis ankaŭ materialojn, afable senditajn de Alina Dolores Zuaznabal Himely el Kubo. Dmitrij Ŝevchenko faris prelegon "Lingvo Esperanto, kiel rimedo de egalrajta komunikado en interreto en la



kondiĉoj de la tutmondiĝo” Kaj Anna Striganova faris prelegon “Sperto de instruado de Esperanto kadre de la programoj de la aldona profesia klerigado en filologia fakultato de Rusia universitato de amikeco inter la popoloj”. Krome, malgrandan sed interesan prezenton faris profesoro Jozef Willem E.F. Haazen, amiko kaj subtenanto de la E-klubo “Kariĵono”. En la sekcio partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj, ĉefe lokaj studentoj. Ili faris demandojn al la prelegantoj. Post fermo de la sekcio interesiĝantoj venis por ekscii pri kursoj de Esperanto.

Kompreneble, krom la sekcio mem pri Esperanto, partopreno en aliaj sekcioj kaj komunaj kunsidoj, eĉ kafopaŭzo donis eblon komuniki kun aliaj partoprenantoj de la Sankt-Peterburga universitato, de aliaj universitatoj, de la Akademio de la sciencoj, kun ĵurnalistoj kaj reprezentantoj de sociaj organizoj. Mi, ekzemple, renkontiĝis kun mia konato, ĵurnalisto el Bulgario Georgij Kolarov, kiu jam favore rilatas al Esperanto.

La komisiono de REU pri eksteraj rilatoj planas ankaŭ estonte uzi similajn eventojn por popularigi Esperanton inter neesperantistoj.

Mikaelo Ĉertilov

4 prelegoj pri Esperanto

La 2–4 de oktobro en Rusio, Sankt-Peterburgo, okazis internacia forumo Rusio kaj Iberameriko en tutmondiĝanta mondo: historio kaj nuntempo. La aranĝo okazis baze de Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato (SPBU) kun subteno de la aliaj universitatoj kaj diversaj organizoj.

Kadre de la forumo, la 4 de oktobro, okazis ronda tablo Esperanto, kiel ponto inter Rusio kaj Latin-Ameriko.

Ĉefaj prelegantoj de la ronda tablo estis Mikaelo Ĉertilov, estrarano de REU, kiu faris prelegon Grandaj kulturoj kaj iliaj bezonoj pri komunikado; Dmitrij Ŝevĉenko, reprezentanta Rusian universitaton de amikeco inter la popoloj (RUDN) prelegis pri Lingvo Esperanto, kiel rimedo de egalrajta komunikado en interreto en la kondiĉoj de la



tutmondiĝo; Anna Striganova havis prelegon Sperto de instruado de Esperanto kadre de la programoj de la aldona profesia klerigado en filologia fakultato de Rusia universitato de amikeco inter la popoloj. Mikaelo Bronŝtejn, kiu ĉeestis nur la unuan tagon de la forumo, malĉeeste kontribuis kun la temo Kurso de Esperanto surbaze de la fabeloj kun plikomplikiĝantaj tekstoj. Kiel honora gasto la rondan tablon partoprenis ankaŭ konata esperantisto el Belgio Jozef Willem E.F. Haazen. Laŭ la rezultoj de la forumo libroforme estos publikigita artikolaro, kie aperos artikoloj ankaŭ pri Esperanto.

Mian artikolon pri la forumo legu en la novembra numero de la revuo Esperanto.

Dima Ŝevĉenko

Pri Nikolaj Incertov en ekspozicio memore al stalinaj viktimoj

La 31-an de oktobro en “Muzeo de avangardo” (Galerio sur Ŝabolovka) malfermiĝis ekspozicio, dediĉita al viktimoj de politikaj represalioj. Ĝi rakontas pri tiuj, kiuj loĝis en la kvartalo, kie troviĝas la galerio (ĉiuj 15 domoj de la kvartalo – eksperimenta konstruaĵo en konstruktivisma stilo far arkitekto N. Travin – havis iam la saman numeron – 11 laŭ Ĥavsko-Ŝabolovska strateto). Ekde 1937 ĝis 1939 el ĝi OGPU-NKVD arestis tie 24 homojn; ĉiuj estis mortpafitaj. Inter ili estis tajloro, kinofilmisto, kuracisto-epidemiologo, aktoro, tekstokorektisto, direktoro de fabriko senlaborulo... Inter ili estis nenio komuna, krom la loĝloko.

Okaze de la 80-jariĝo de la Granda Teroro en la Tago de politikaj reprezaliitoj la muzeo decidis rakonti pri 5 el la mortigitoj, pri kiuj la muzeaj kunlaborantoj kaj lokaj aktivistoj (Aleksandra Selivanova, Inna Drobinskaja ka.) faris arkivajn esplorojn. Inter ili estas ankaŭ unu fama esperantisto – Nikolaj Incertov (1896-1937), dum longaj jaroj respondeca sekretario de SEU. Por pliiĝigi la donitaĵojn pri Incertov, la organizantoj de la ekspozicio turnis sin al REU. De esperantistoj ili ricevis certajn informojn, tradukojn al la rusa de kelkaj materialoj kaj ĝeneralajn skizojn pri la represalioj kontraŭ esperantistoj, kaj kelkajn malnovajn eldonaĵojn por ekspono. Dum la malfermo de la ekspozicio ĉeestis Nikolao Gudskov kaj Valentin Seguru, Gudskov elpaŝis pri Incertov kaj persekutoj kontraŭ esperantistoj.



Sur la foto (de maldekstre): Fama usona kantisto Paŭl Robson, malantaŭ li staras Nikolaj Incertov; sidas: famaj sovetiaj poetoj Miĥail Svetlov (en okulvitroj) kaj Lev Kassil, dekstre — Ernest Drezen, ĝenerala sekretario de CK SEU.

La ekspozicio troviĝas laŭ la adreso Serpuĥovskoj val, 24, konstruaĵo 2, ĝi daŭros ĝis 21.01.18.

Nikolao Gudskov

Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburgo

Pri la studprogramo

Dato: 04. – 06. 11. 2017

Loko: Jekaterinburgo, sanatorio “Uktus”

Moto de la lingvotrejnado: “Halti sur vojo al alto – signifas regliti” (Nikolao Kurzens).

Organiza grupo: Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) – ĉefkunordigado kaj gvidado, prizorgado de la porinfana programo (kune kun Jelena Kuznecova el Samaro), kunordigado de vesperaj klerigaj kaj distraj programoj;

Pavel Veselov (Tjumen) – prizorgado de la komputila servo kaj retligoj, pretigo de nomŝildoj, certigiloj, honorfolioj kaj leciontabelaj afiŝoj;

Vladimir Opletajev (Surguto) – Estrarano de REU, kunordigado de la A kaj B-nivelaj studprogramoj.

Numero de la partoprenintoj: 38 personoj el 18 urboj de Rusio.

Celoj de la lingvotrejnado. La trejnado celis aktivigi lingvokononjn de ĉiuj aliĝintoj, evoluigi iliajn bazajn lingvokapablojn: aŭdan komprenon, parolkapablojn, skribokapablojn, legokomprenon, trakti fonajn kulturajn kaj movadajn temojn per lingvaj ludoj kaj konkursoj, vesperaj programoj, metiejoj, prelegoj ktp. En la A-nivela grupo la concernaj lingvaj kaj parolaj enhavo riveliĝis diversnombre sed relative ekvilibrte:

gramatiko – en 2 lecionoj;

leksiko – en 3;

prononco – en 1;

aŭskultado – en 3;

parolado kontinua – en 3;

parolado interaga – en 7 lecionoj.



En la B-nivela grupo gramatikaj kaj leksikaj temoj aparte ne estis traktataj, ĉar la temojn de lecionoj rajtis elekti laŭ propraj preferoj la instruistoj mem, tial pli fortan emfazon havis paroligaj lecionoj kaj engrupaj kreaj aktivadoj de kursanoj:

prononco – en 1leciono;

legado – en 4;

aŭskultado – en 3;

parolado kontinua – en 4;

parolado interaga – en 6;

skribado / verkado – en 4 lecionoj.

Ekzemple dum la 60-minuta leciono de Darja Zelenina pri la temo “La gazeto de la Aŭtuna lingvotrejnado” la kursanoj, dividitaj je kelkaj laborgrupoj, prosperis krei kaj prezenti fine de la instruhoru kolekтивan produkton de sia kunagado - tre interesan kaj spritan murgazeton kun kolofono, intervjuo, raportoj, humuraĵoj, amuzaj reklamaĵoj ktp.

Krome antaŭ la matenmanĝo, kiu komenciĝis je la 9a horo, funkciis lingva konsultejo, en kiu kursanoj povis konsulti instruistojn kaj individue okupiĝi kun ili pri diversaj gramatikaj kaj leksikaj temoj.

Instruistoj: Darja Zelenina (Ĉelabinsko), Roman Jefremov (Glazovo), Vladimir Opletajev (Surguto), Konstantin Ĥlizov (Jekaterinburgo), Irina Gonĉarova (Odincovo), Tatjana Vŝiveva (Miasso). En la A-nivela grupo lecionojn gvidis entute 6 instruistoj, en la B-nivela grupo – 3 kursgvidantoj. Inter ĉiuj instruistoj 4 personoj havis C1-gradan kvalifikon laŭ la kriterioj de la KER-ekzamenado.

Ĉiuj lecionoj de Darja Zelenina estis eksplicite mens-vigligaj kaj kunagad-aktivigaj, ili efikis kiel pro la modernaj metodoj tiel pro la variaj kaj adekvataj kaj lerte kombinitaj instruformoj. La lingvaj ludoj, kiujn majstre gvidis Roman Jefremov, estas liaj propraj Esperantaj adaptaĵoj de konataj rusiaj intelektaj teamaj ludoj “Kio? Kie? Kiam?”, “Ĉies ludo” (“Svoja igra”), “Pentristoj” ktp. Ĉiuj ludoj de Roman ne nur amuzis la partoprenantojn sed ankaŭ multe instruis ilin pri ekstermovadaj kaj movadaj temoj. Vladimir Opletajev prezentis sian legolibron por komencintaj esperantistoj

“Postkursula legaĵo” kaj plezure kaj sukcese enkursigis la ĉapitron “Puŝkin kaj la ĉefguvernisto” el ĉi tiu tekstaro. Irina Gonĉarova kapablas paroligi eĉ plej neparolemajn homojn, sed ĉi-foje ŝi krome aparte skuis ĉies korojn kaj okulojn per prezento de sia projekto “Esperanto-poŝtkruiciĝo” kaj belega kolekto de poŝtkartoj el diversaj landoj. Konstantin Ĥlizov ne nur gaje babiligis siajn lernantojn sed ankaŭ kantigis ilin, ĉar li jam multe spertas instrui Esperanton per kantoj. Tatjana Vŝiveva, ĉiam pozitive agordita, klopodis en siaj lecionoj diversrimede peri al kursanoj propran entuziasmon pri la lingvo.

Konklude: la kolekto de spertaj kaj diligentaj instruistoj, zorge realiginta la tutan studprogramon, iĝis tre profesia teamo, pri kiu oni povas fieriĝi kaj kiun mi kore dankas pro la atingitaj rezultoj.



Kursanoj: A-nivela grupo – 5 personoj el 4 urboj; B-nivela grupo – entute 14 personoj el 9 urboj.

La tuta programo celis lingve kaj parole pliaktivigi la aliĝintajn kursanojn. Ili estis tiu dezirata celgrupo, kun kiu aktive partneris dum du tagoj la instruista teamo. La A-niveluloj klopodis konfirmi siajn konojn kaj plibonigi ilin: iu volis ree ekparoli post multjara paŭzo, iu danke al la

trejnado strebis superi siajn psikologiajn parolbarojn, ĉar la programon partoprenis krom malbone parolantaj esperantistoj ankaŭ memlernantoj. La B-nivela grupo konsistis plejparte el spertaj parolantoj. Kelkaj membroj de MASI danke al la KER-ekzameno jam atingis la superan C-nivelon, sed, ĉar en Rusio similaj studadoj maloftas, kaj ĉi tiu lingvotrejnado ne povis oferti al ili la deziratan



studgradon, ankaŭ la kvarpersona MASI-teameto eniris la B-grupon kaj furoris en ĝi: Aleksandr Basov (Luberci), kiu iĝis partopreninto de ĉiuj tri lingvotrejnadoj, ricevis libropremion pro la tre bela deklamado de la originala poemo “La ratoj” de Mikaelo Giŝpling; la juna Petro Fedosov el Moskvo pro sia senbrida ŝtorma kaj senlaca aktivado kaj ĉiama engaĝiĝo dum kaj ekster la lecionoj gajnis ĉiajn eblajn premiojn kaj laŭdojn. La laŭdojn meritas ankaŭ la memlernantoj kaj ĵusaj kursfinitoj de Esperanto: Sergeo Kumkov (Jekaterinburgo) kaj Nastja Zalogina (Verĥnaja Piŝma), Dmitrij Rzanin (Revda), montrintaj tre seriozan sintenon al la lingvaj okupoj. Apud la novaj esperantistoj la studbendon okupis ankaŭ kolegoj kun kelkjardeka parolsperto. Sen ilia partopreno la lecionoj ne estus tiaj emocibuntaj: Vladimir Terjoĥin (Jekaterinburgo), Jelena Uspenskaja (Jekaterinburgo), Jekaterina Maliŝeva (Sankt-Peterburgo), Lidija Jerofejeva (Niĵnij-Tagilo), Irina Kirina (Sredneuralsko).

Krom du modifoj en la leciontabelo de la A-nivela grupo, kondiĉitaj de objektivaj kaŭzoj, la tuta studprogramo estis sukcese realigita. Ĉiuj kursanoj ricevis belajn certigilojn pri la partopreno en la Aŭtuna lingvotrejnado, ĉiujn instruistojn la Organiza grupo honoris per dankletoj kaj donacetoj.

Jen estas interesa kaj utila movada kaj instrua sperto, al kies daŭrigo estas alvokataj esperantistaj kolektivoj el aliaj regionoj de Rusio.

Informa programo pri REU

La 5an de novembro kadre de la vesperaj kulturklerigaj aranĝoj okazis informa programo pri Rusia Esperantista Unio, kiun partoprenis 4 membroj de la Estraro: Irina Gonĉarova, Aleksandr Lebedev, Aleksandr Mitin, Vladimir Opletajev. Unue Vladimir Opletajev per komputila prezentaĵo kurte informis la ĉeestantojn pri la historio de la esperantista movado en Rusio ekde la unua oficiala esperantista societo en Sankt-Peterburgo (1892) ĝis la 29a Konferenco de REU dum RET-2017 en Poŝeĥonjo. La ĉeestantoj sciiĝis pri la statutaj celoj kaj taskoj de REU kaj aktualaj agadirektoj de la Estraro. Inter la partoprenantoj de la lingvotrejnado estis 8 membroj de REU, kiuj pro la membreco en REU havis tridekprocentan aliĝrabaton. Aleksandr Lebedev rakontis pri la lanĉita Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev» kaj pri la

REU-kotizregularo por 2018. Aleksandr Mitin informis la kunvenintojn pri la paĝaro “reu.ru” kaj ĝiaj servoj, Vladimir Opletajev donis klarigojn pri la instru-metodika agadirekto, Irina Gončarova raportis pri la aktualaj celoj de la regiona agado kaj unuaj realigitaj de ŝi en aŭtuno tiudirektaj projektoj. Aleksandr Lebedev akceptis membrotizojn por 2018.

Vladimir Opletajev (Surguto)

Klubo de instruistoj

Al instruantoj de Esperanto, kursgvidantoj, estroj de esperantistaj kluboj, regionaj REU-kunordigantoj, esperantistoj-aktivuloj.

Konforme al la Laborplano de la Estraro de REU estas planate meze de la jaro 2018 publikigi analizan raporton pri la instruado de Esperanto en Rusio en la instrusezono ”Aŭgusto 2017 – junio 2018”. Unuavice la projekto koncernas individuajn kaj asociitajn membrojn de REU, sed mi turnas min ankaŭ al ĉiuj rusiaj esperantistoj, kiuj instruas Esperanton, sed ne membras en REU, subteni la iniciaton kaj aktive kunlabori kun la Estraro de REU, por kolektive krei aŭtentan komunan bildon pri la instru-metodika agado en la nuna lernoĵaro.

En diversaj urboj de Rusio jam ekfunkciis kursoj de Esperanto. En la unua etapo de la proekto, ligita kun la kolektado kaj sistemigo de informoj kaj datumoj, individuaj kursgvidantoj kaj klubaj respondeculoj pri instruado estas petataj, post fino de koncerna loka Esperanta kurso, akurate plenigi demandilon pri la okazigita kurso kaj per tio kontribui al la komuna, kolektive kreata datumbazo.

Kolegoj, se vi volas, ke informoj pri via loka kurso kaj via instrua agado, sendepende de via aparteno al REU, iĝu parto de komuna raporto kaj apartenu al analizebla dokumentaro, vi estas petataj subteni la projekton.

La demandilo konsistas entute el 20 paragrafoj, el kiuj deko da demandoj prezentas plurecan respondekteblon kaj havas por elekto kelkajn pretajn variantojn de respondoj. Ĝi estas do bone komprenebla kaj facile uzebla, kaj la plenigo de la demandilo okupas tre malmulte da tempo, nur kelkajn minutojn. Oni povas aparte leterforme respondi al ĉiuj demandoj aŭ, uzante la demandilon, nur kontrastigi aŭ kursivigi elektitajn respondojn aŭ marki taŭgan varianton de la respondaro per ajna koloro. La dek-oka demando pri la averaĝa aĝo de kursanoj ne postulas strikte precizan nombron, sufiĉas ke kursgvidanto proksimume taksu ĉi tiun parametron.

Vladimir Opletajev

Rusia Esperantista Unio

Instru-metodika agado

Instrusezono: aŭgusto 2017 – junio 2018

Raporto pri la kurso de Esperanto

1. Persona, familia nomo de Esperanto-instruisto/ kursgvidanto.
2. Loĝloko / urbo.
3. Jaro de esperantistiĝo de la kursgvidanto.
4. Membreco de la kursgvidanto en REU:
 - individua membro de REU;
 - membro de asociita REU-kolektivo (asocio, klubo, societo, rondeto ktp);
 - ne estas membro de REU.
5. Profesia kvalifiko de la kursgvidanto:
 - diplomita lingvoinstruisto;
 - trejnita Esperanto-instruisto (povas esti sen lingvoinstruista diplomo);
 - amatora instruanto de Esperanto.
6. Titolo de la kurso.
7. Tipo de la kurso:

- movada kurso;
 - lerneja kurso;
 - universitata kurso;
 - dumaranga kurso;
 - koresponda kurso;
 - distanca reta / skajpa kurso.
8. Nivelo de la kurso:
 - baza kurso (por komencantoj - A1, A2);
 - progresiga kurso (por komencintoj - A2, B1, B2);
 - altnivela (por flue parolantoj - C);
 - faka, ekzemple, porinstruista / tradukista ktp. kurso - C.
 9. Programo de la kurso:
 - aprobita programo de lerneja / universitata ktp. administracio;
 - aprobita programo de kluba estraro;
 - aŭtora programo (de neniu aprobita);
 - sen programo.
 10. Uzita lernolibro / kurso:
 - **Bonvolu indiki aŭtoron kaj titolon de lernolibro;*
 - propraj instrumaterialoj;
 - sen lernolibro.
 11. Kursejo:
 - Esperanto-klubejo;
 - lernejo / universitato;
 - biblioteko;
 - kulturpalaco;
 - oficejo;
 - privata loĝejo;
 - alia Kursejo. **Bonvolu indiki alian kursejon, ekzemple: kafejo, publika kunvenejo, turista bazejo ktp.*
 12. Metodoj de la instruado:
 - gramatika metodo;
 - rekta metodo;
 - miksita metodo;
 - aŭdvida metodo;
 - situaci-komunika metodo;
 - Cshe-metodo;
 - alia metodo. ** Bonvolu indiki alian metodon.*
 13. Daŭro de la kurso (en monatoj). ** Ekzemplo: oktobro, novembro, decembro 2017 – 3 monatoj.*
 14. Nombro de lecionoj. **Ekzemplo: 10 unuhoraj /duhoraj / trihoraj ktp. lecionoj.*
 15. Formoj de la taksado de lingvokonaj:
 - gramatika, leksika ekzameno;
 - taksado per testoj;
 - skriba / buŝa traduktasko;
 - intervjuo: instruisto – kursano;
 - monologa sinprezento;
 - interaga paroltasko (dialogo / polilogo);
 - skriba verko;
 - alia formo de la taksado de lingvokonaj. ** Bonvolu indiki alian formon de la taksado de lingvokonaj.*
 16. Formoj de la atestado:
 - atestilo kun indiko de la atingita nivelo;
 - atestilo pri la kursofino;
 - certigilo pri la vizitado de kurso;
 - sen atestilo;

- honorfolio / dankletero;
 - Esperanta memorajo;
 - diplomo;
 - alia formo de la atestado. **Bonvolu indiki alian formon de la atestado.*
17. Nombro de kursfinintoj. **Ekzemplo: 3 personoj.*
 18. Averaĝa aĝo de kursfinintoj. **Ekzemplo: 18 jaroj.*
 19. Dato: **Ekzemplo: 31. decembro 2017.*
 20. Plenuminto / verkinto de la raporto; retadreso.
 - * Ekzemplo: Viktor Petrov, prezidanto de la klubo "E". < instrua@lern.net >.*

Vladimir Oletajev, membro de la Estraro de REU surborde@mail.ru

Esperanto-instruistoj de Rusio

Darja Zelenina

Naskiĝdato: 6. januaro 1992.

Jaro de esperantistiĝo: 2008.

Loĝloko: Ĉelabinsko, Suda Uralo.

Profesio: diplomita instruisto de la angla lingvo, trejnita lingvoinstruisto, finis la Lingvistikan fakultaton de Ĉelabinska Ŝtata Universitato en 2014, laboras kiel teknika verkisto en komputilfirmao.

La gepatra lingvo: la rusa.

Studitaj fremdaj lingvoj: la angla, Esperanto, la franca, la germana, la nederlanda, la sveda, la turka.

Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la kursoj de Esperanto: rekta, miksitaj metodoj.

Esperantlingva kvalifiko: KER-ekzameno – C (2012)

Instrupertoj: movadaj kursoj por studentoj, instruado en SES-Rusio (2014), Esperanto-lecionoj en Ural-Siberiaj printempaj esperantistaj renkontiĝoj EsPrimo, Lingvotrejnadoj en Jekaterinburgo.

Instruista kredo: instruado de fremda lingvo estas plejparte babilado pri vivo en tiu lingvo.

Ŝatata aforismo: ni admiras aforismojn, sed malofte strebas sekvi eĉ unu.

Intervjuo kun Darja Zelenina okaze de la Aŭtuna lingvotrejnado 2017 en Jekaterinburgo

1) Daŝa, videblas, ke Esperanto ne estas unusola lingvo, kiun vi flue parolas. El kio fontis via amo al fremdaj lingvoj kaj lingvistiko?

Mi devas konfesi, ke mi ekinteresiĝis pri fremdaj lingvoj nur pro tio, ke mi havis talenton kaj relative facile lernis ilin. Tamen poste mi ekinteresiĝis serioze, ĉar lingvo estas vere mirinda fenomeno, kiun multaj subtaksas, kaj mi admiras ĝin des pli, ju pli mi lernas pri ĝi - eĉ se lastatempe tio estas nur hobbio.

2) Vi ofte vojaĝas tra la mondo kaj havas proprajn spertojn pri tutmondiĝaj tendencoj en la lingva sfero. Ĉu reala multlingvismo (ekzemple, bilingvismo en la lerneja praktiko de la Eŭropa Unio) kiel produkto de la edukado estas defio de nia tempo?

Ne. La amase kaj malbone parolata angla lingvo estas defio de nia tempo.

3) Ĉu la komunikado kun diverslandanoj en Esperanto havas apartajn trajtojn kompare kun internaciaj kontaktoj en aliaj lingvoj?

Certe. Kiam eksterlandano parolas vian denaskan lingvon, vi povas reagi iel ajn – pozitive (“Ho, via rusa estas bonega; kiel vi lernis ĝin?”), negative (“Pardonu, ĉu vi povus paroli angle?”), neŭtrale



(fakte, tio neniam okazas) – sed ĉiam restos abismo inter vi kaj via adresato: vi ĉiam estos la denaskulo, kaj via adresato ĉiam estos la eksterlandano. Kiam oni parolas Esperante, almenaŭ laŭ mia sperto, ĉiuj fajfas pri tio, kial ili parolas ĝin, kiom bone, kiu estas denaskulo kaj kiu ne – ĉiuj estas egalaj, neniu superas alian en iu ajn senco.

4) Kiujn ecojn de Esperanto vi nepre emfazas, instruante ĝin al homoj en diversnivelaĵoj kursoj?

Dependas de la homoj. Al tiuj, kiuj ne parolas fremdajn lingvojn, mi rakontas pri tio, ke Esperanto estas lingvo ĉies kaj nenies, kaj la sola kiun ili povas vere alproprigi; pri ĝia facila sonsistemo, kaj ankaŭ pri tio, kiom facile estos lerni aliajn lingvojn post Esperanto. Sed por nelingvistoj tre gravas, kie ili uzos la lingvon, do mi nepre multe rakontas pri la movado, internaciaj aranĝoj kaj Pasporta servo.

Por lingvistoj mi kutime emfazas la regulan gramatikon kaj vortfaradon, pridiskutas apartajn gramatikaĵojn, la sonsimstemon kaj akĉentojn, ktp. Lingvistoj ne ĉiam celas paroli Esperanton, sed multaj interesiĝas pri ĝia strukturo kaj evoluo.

5) Kiujn didaktikajn komponantojn de la Esperanto-instruado vi konsideras aparte gravaj: motivado de kursanoj, elekto de instrumentadoj, taŭga lernolibro, organizaj formoj de kursoj, testado de lingvokonoj, atestado ktp?

Tio dependas de lernantoj, iliaj motivoj kaj preferataj stiloj de lernado: kelkaj tute ne bezonas lernolibron, aliaj estas motivitaj de testoj, sed nur se ili sukcesas, ktp. Aparta problemo estas ĉu ili ĝuas la lecionojn – kaj por tio necesas, ke estu bona kompanio, ke la lernantoj ŝatu la temojn, ke ili multe parolu, ke ĉiu leciono estu iu surprizo, kaj ke estu bona etoso dum la lecionoj. Se tio sukcesas, la lernantoj eĉ ne rimarkas, ke ili fakte lernas la lingvon.

6) Ĉu vi havas proprajn sekretojn pri tio, kiel oni povas pli rapide kaj efike lerni fremdajn lingvojn kaj Esperanton?

Mi timas, ke miaj “sekretoj” ne estas tro sekretaj, sed ili certe funkcias. Komencu en retpaĝaroj kun ludoj por lerni lingvojn (ekzemple, Lingualeo): ili estas interesaj kaj efikaj, sed nur taŭgas por komencantoj. Kiam vi jam konas centon da vortoj kaj iom da gramatiko, estas tempo por skribi taglibron kaj legi ŝercojn en via lingvo. Ne serĉu ĉiujn nekonatajn vortojn en vortaro; lernu nur tiujn vortojn, kiujn vi mem ofte uzas. Kiam vi komencas rakonti pri vi mem kaj kion vi faras ĉiutage sen troa streĉo, estas tempo por trovi YouTube-videojn en via lingvo kaj babilu kun eksterlandanoj (en Facebook, forumoj aŭ babilejo). Ju plu flue vi parolos, des pli malfacile estos pliboniĝi, sed vi tamen spektu filmojn (prefere seriojn), legu Vikipedion, ĵurnalojn, rakontojn, blogojn, novaĵojn, skribu kaj babilu laŭeble plej multe; partoprenu konkursojn; se vi konas aliajn lernantojn, organizu parolkklubon kun diskutoj, prezentoj, eventoj kaj ludoj en via cello. Esploru temojn, pri kiuj vi lastfoje parolis antaŭ multaj jaroj: legu lernolibrojn de mezlernejo, popularsciencajn librojn, vidu dokumentajn filmojn. Ĉiujn vortojn, kiujn vi lernis ekde via naskiĝo en via denaska lingvo, vi devas lerni en via cello.

Interreto pri ni

En “Viva ĵurnalo” aperis artikolo pri Esperanto en la rusa lingvo: <http://systemity.livejournal.com/4347084.html?mode>. La artikolo estas iom stranga, kun pluraj elpensaj kaj misinformoj, sed vige verkita kaj interesa pro la fakto mem, ke la homo sin turnis al la temo, kiun rememoris post jardekoj de malaktivado. Ĝin verkis iama esperantisto, nun maljuna kaj loĝanta en Usono, Jakov Frejdin – eble, iu lin memoras...

Laŭ informo de Vladimir Minin



Lingvaj festivaloj tra la lando

Novosibirsko: La dua Lingva Festivalo



Lingva Festivalo, brila ideo de esperantistoj, vagas tra la mondo kaj kunigas popolojn. La siberia urbo Novosibirsko danke al la urba Esperanto-klubo en 2016 alligis al ĉi tiu movado. Unu jaron poste, la 14an de oktobro 2017 okazis la dua festivalo. Ĉi-foje estis prezentitaj 17 lingvoj. Al la festivalo venis lektoroj el la urba internacia literatura klubo, el la nacia tatara centro kaj el kelkaj centroj de eŭropaj

lingvoj. La venintaj interesiĝantoj pri lingvoj povis viziti kvin prelegojn, kaj ĉiufoje ili elektis el ses diversaj programeroj. En la granda halo, inter la prelegoj oni povis rigardi librojn en diversaj lingvoj, fotiĝi en naciaj ĉapeloj kaj trinki teon. Esperanto estis digne prezentita dum la festivalo. Sergej Borisoviĉ Pokrovskij, direktoro de la sekcio “Gramatiko” de la Akademio de Esperanto, rakontis pri la lingvo kaj ĝia historio. Stanislav Kacko, kiu dum unu jaro partoprenas en Poŝtkruciĝo, montris multajn bildkartojn el diversaj urboj de la mondo. Sergej Zajnutdinov, junulo ĵus fininta kurson de Esperanto, rakontis pri sia sperto en la Somera Esperanto-Studado en Slovakio. Daria Arbekova kantis Esperanto-kanton kaj rakontis pri sia partopreno en la 102a Universala Kongreso en Seulo. Ankaŭ mi prezentis la lingvon kaj reklamis la kurson de Esperanto, kaj tuj post la festivalo la nova kurso estis lanĉita. Al la unua leciono venis naŭ personoj. Do, mi povas diri ke la festivalo estis fruktodona!

Katerina Arbekova

LF en Ĉeboksaro: Malpli amasa ol antaŭe

La 22an de oktobro en la Ĉuvaŝa ŝtata pedagogia universitato okazis la 22a Lingva Festivalo. La tuta programo de la festivalo pasis en kvar blokoj po 45 minutoj. Estis anoncigitaj 44 programeroj, el kiuj kelkaj ne okazis pro neveno de la prezentantoj. Se kalkuli lingvojn, da tiuj estis prezentitaj nur 28. Venis ĉ. 200 gastoj. La fama festivalo en Ĉeboksari, iam okazanta dum la tuta semajno kaj brakumanta kelkajn ĉeboksarajn atlernejojn kaj regionajn mezlernejojn, kaj dutaga en Ĉeboksari mem, iam kolektanta ĝis mil aŭ eĉ pli da gastoj, salutata de ambasadoroj, vizitata de eksterlandaj esperantistoj prezentantaj siajn lingvojn, – ĉi tiu fama festivalo de jaro



al jaro ŝrumpas. Estas multaj objektivaj kialoj, sed nur unu ni menciuj. La atento de Aleksandr Blinov – la iniciatinto de la festivalo kaj dum pluraj jaroj ĝia ĉefa motoro kaj prizorganto – pli kaj pli transŝaltiĝas al la problemoj de la defendo de la ĉuvaŝa lingvo kaj kulturo, kiuj pli kaj pli akriĝas. Tamen la ĉefa organizanto de la Ĉeboksara LF restas la privata entrepreno “Lingvo por sukceso”, kies direktoro estas Aleksandr Blinov. Tio ebligas al la festivalo daŭre vivi kaj konservi la ĝustan etoson de amo al lingvoj kaj sindona laboro de prezentantoj kaj volontuloj. Granda ŝarĝo kuŝis sur la ŝultroj de la du junulinoj, Svetlana Kopilova kaj Darja Svincova, kiuj faris la tutan organizan laboron. Ĉi-jare denove kelkaj membroj de la Moskva Esperanta Asocio MASI partoprenis la festivalon: mi kaj Pjotr Fedosov kiel prezentantoj de Esperanto, la poligloto Nikita Kuznecov kiel prezentanto de la adigea lingvo, kaj Aleksandr Lebedev kiel kompetenta vizitanto. Mi havis du lecionojn – post kiuj sekvis invitoj de Aleksandra Moiseeva veni al Esperanta kurso ĉe la “Lingvo por sukceso”. La klasĉambro de la 12-jara Petro Fedosov estis plenŝtopita: por kelkaj ne sufiĉis seĝoj, kaj la homoj stari, apogante sin ĉe la muroj. La publiko de la festivalo estis tre ĉarma – juna, danka, fidela kaj scivolema, kvankam ĝi ŝajnis esti ne tiel klera, kiel en Moskvo. Esperanto konstante sonis de la scenejo dum la solenaj Malfermo kaj Fermo: jam pro la tradicio de la Ĉeboksara LF fari anoncojn en la rusa, ĉuvaŝa kaj Esperanto. La festivalon kronis koncerto – kiel ĉiam, tre altkvalita kaj bela (danke al Irina Romanova), sed ne lacige longa. Ĉio sume faris bonan etoson kaj impreson. Post la festivalo la esperantistoj bele etosumis en soveti-stila restoracio. Mi esperas, ke en la sekva jaro moskvaj prezentantoj venos pli amase por subteni la amatan kaj estimatan lingvan festivalon en Ĉeboksari. Kaj ni atendas ĉiujn por la 12a Moskva Lingva Festivalo la 10an de decembro 2017!

Irina Gonĉarova

La Moskva Festivalo invitas por la 12a fojo

La 12a Moskva Lingva Festivalo okazos la 10an de decembro 2017, dimanĉe. Nin denove akceptos Centro de Pedagogia Majstreco, kiu tre plaĉis al ĉiuj pasintjare. Ĝi estas tre oportuna kaj havas vastajn helajn klasojn kaj koridorojn. Ĉi tiu festivalejo estas pli malgranda, ol niaj antaŭaj gigantoj, kaj ĝi ne havas salonegon por pompaj solenaĵoj, sed tio portas siajn plusojn: la Malfermo kaj Fermo estos reduktitaj kaj la programo iĝos pli observebla. Ni orientiĝu ĉi-foje ne je 100, sed je 70 programeroj: 50 lingvoj, 10 prelegoj kaj 10 praktikoj. La festivalon organizas Moskva Esperanto-Asocio MASI. La organiza teamo kaj la teamo de la prezentantoj estas grave renovigata. Ni invitas por kunlaboro ekspertojn-lingvistojn, kuratorojn, teknikistojn, popularigantojn de la festivalo kaj, certe, lingvajn prezentantojn kaj prelegantojn! Kaj gastojn, gastojn, gastojn! Ĉiuj laboroj estas volontulaj, la eniro estas senpaga. Ni petas ĉiujn (instruantojn, volontulojn, gastojn) registriĝi ĉe <http://www.lingvafestivalo.info/> Bonvenon!



Irina Gonĉarova

La tri supraj artikoloj pri LF-oj estas represitaj el “La Ondo de Esperanto”, n-ro 11-2017 (277)

Premio por interlingvistika libro

Ĉi-jare en la mallongan liston de la premio “Klerigisto” (Prosvetitel), kiun oni aljuĝas al la aŭtoroj de la plej bonaj scienc-popularaj ruslingvaj libroj (la premio ekzistas ekde 2008), eniris, en la nominacio “Humanaj sciencoj” (inter aliaj 4 verkoj) la libro de Aleksandr Piperski “Konstruado de lingvoj. De Esperanto ĝis dothrakia” (Александр Пиперски, «Конструирование языков. От эсперанто до дотракийского», издательство «Альпина нон-фикшн», 2017). La fondintoj de la premio ne nur donas monsumon al la aŭtoroj (700 mil RUR al la gajninto, po 100 mil al la trafintoj en la mallongan liston), sed ankaŭ dissendas kompletojn de la premiitaj libroj al bibliotekoj de la tuta Rusio.



La libro de Piperski temas pri diversaj specoj de artefaritaj lingvoj – filozofizaj kaj logikaj, uzataj en beletraĵoj ktp, kaj inter ili pri internaciaj “helpaj” lingvoj, inkluzive, certe, Esperanton – bedaŭrinde, ne sen kelkaj eraroj pri ĝia historio kaj gramatiko. Pipersiki ne estas nia amiko, nek, samtempe, malamiko. Lia merito estas (same, kiel merito de Umberto Eco), ke li konsideras “artefaritajn lingvojn” objekto de scienca intereso kaj esploro, kaj objektivisme (kio ne egalas al objectiveco!) ilin konsideras. Ekzemple, li abunde ripetas antaŭjarcentajn lingvistikajn kritikojn



kontraŭ Esperanto (sed ne parolas pri kaŭzoj de ĝia sukceso), sed, samtempe, sufiĉe trafe rakontas pri disvastigeo de Esperanto kaj kvanto de ties parolantoj.

Ĉu li ricevos la unuan premion (klaros la 16-an de novembro), ĉu ne, lia libro altiras atenton al interlingvistiko ĝenerale kaj al Esperanto speciale, kaj ĝia trafo al la mallonga listo (kaj eventuala premio) certe disvastigos sciojn pri la afero en la interesiĝantaj amasoj – ja la vorto “Esperanto trovis lokon eĉ en la titolo!

Interesiĝantoj povas trovi la libron en la reto kaj pumpi ĝin por legi en elektronika (bita) formo, ekzemple en: <http://mruator.org/torrent/809469/aleksandr-piperski-konstruovanie-yazikov-ot-esperanto-do-dotrakiyskogo-2017-fb2>.

Nikolao Gudskov

Regiona agado

Stato de la Movado en Ĉuvaŝio

La 22-an de oktobro en Ĉeboksaro pasis la 22-a Lingva Festivalo, kaj vesperon antaŭe kelkaj malnovaj ĉeboksaraj esperantistoj venis por renkontiĝi kun Irina Gonĉarova, REU-respondeculo pri la regiona agado.

La ĉeestantoj esprimis siajn pensojn kaj sentojn pri la nuna stato de la esperantista vivo en Ĉuvaŝio.

Ĉiuj konsentis, ke la teritorio de Volgio estas tiom granda, ke ĉiu ĝia federacia subjekto devas havi sian kunordiganton, kunlaborantan kun la Volgia kunordiganto Ildar Kijamov. Kompreneble, neniu el la kunvenintoj estis preta tuj surprizi la taskon prizorgi Ĉuvaŝion.

Komence sonis nur opinioj, ke por la skipo de la eksaj aktivuloj – kun familioj kaj infanoj - la tempo de aktiva agado pasis, ke estingiĝis la iama flamo kaj nun jam nenio en Esperantujo entuziasmigas ilin.

La motoro de Ĉuvaŝa Esperantujo Aleksandr Blinov diris, ke forestas la flamiga ideo: kunveni pro nura lingva praktiko (“la lingvo por la mem lingvo”) ne indas penojn kaj tempon; li mem nun dediĉas sin al la nacia agado, ĉar tie la ideo ero estas multe pli evidenta. Restante firma esperantisto, li, tamen, ĉiam pretas subteni E-agadon. Li multe prelegas en altlernejoj kaj elpaŝas antaŭ ekstera publiko – kaj ĉiam mencias Esperanton. Eksonis voĉoj, ke, jes, tamen, necesas informi kaj instrui novajn homojn, eble eĉ necesus reveni al E-discendoj al la regionoj por semi Esperanton tie.

Iom post iom aperis konkretaj proponoj.

Sergej Tiĥonov por revizii ĉuvaŝan esperantistaron propones revivigi la dormantajn Esperantajn vK- kaj Fb-grupojn. Olga Ivannikova ŝatus regule kolektiĝi familie kaj okazigi “infanajn ĉambrojn” por poiom instrui al ili Esperanton. Daniil Kapitonov trovis interesa renkontiĝi kun la fama mondvojaĝanto kaj motivigi lin dum la planata vojaĝo tra Eŭropo uzi/popularigi Esperanton. Por Aleksandr Blinov estas neniu problemo organizi prelegojn aŭ agitadojn en mezlernejoj, invite dezirantojn al la E-kurso. Al li apartenas la luksa ideo inviti 2-3 eksterlandanojn el diversaj mondopartoj por rondvojaĝado tra Ĉuvaŝio kaj najbaraj respublikoj kun rakontoj pri Eo en urboj kaj vilaĝoj.

Malofte okazas, sed tiu ĉi renkontiĝo tuj donis siajn fruktojn.

Reaktivigi la vK-grupo “Эсперанто

В

Чебоксарх” <https://vk.com/esperanto21> :

- jam la 21-an de oktobro Sergej Tiĥonov publikigis detalan ruslingvan raporton pri tiu ĉi renkontiĝo, kun multaj utilaj ligoj (inter cetere – al nia MiA MASI), kaj anoncis, ke REU serĉas kunordiganton por Ĉuvaŝio;

- la 23-an de

oktobro Aleksandr Blinov, reage al la preparata rusia leĝo pri nedeviga lernado de naciaj lingvoj en lernejoj, publikigis la mesaĝon, daŭrigante la temon pri la ideo esenco de Esperanto:

“La rolo de esperantistoj en la moderna mondo ne tiom estas strebi al la virtuala interkompreniĝo sed fakte en la reala defendo kaj pluekzistigo de la lingva diverseco. Perdigi la regionajn lingvojn signifas perdi la ideon de la planlingvo internacia kiel Esperanto. Ĉu ni esperantistoj kapablas subteni realan lingvan diversecon helpante al la ĉuvaŝa lingvo pluvivi kaj esti daŭre studata en mezlernejoj?”



- la 27-an de oktobro aperis alvoko de Irina Jakovleva por restarigi regulajn kunvenojn de la ĉeboksaraj esperantistoj kun la demando, kiun tagon oni elektu por la ĉiumonata kunveno (voĉdonis 22 homoj);

- Aleksandra Moiseeva, vizitinte la prezenton de Esperanto dum la Lingva Festivalo, konfesis, ke ŝi ektuziasmiĝis denove – kaj invitis ĉiujn al la E-kurso ĉe la lingva kursejo “Язык для успеха”;

- Kaj la eterna komencantino Formiko denove ekdeziris lerni Esperanton! ;)

Irina Gonĉarova

Recenzo (versa)

Juĝesploristo dum la Granda teroro

(traleginte la libron “Sortoj frakasitaj” de M. Bronŝtejn)



Juĝesploristo kaj juĝatoj
En katastrofo de la Teroro
Miskondamnitaj liaj fraroj
Torturo, koncertejoj, hororoj.

Kiam kulpige li tempestis,
Ĉu io flustris ĉiam pli?
ke malamikoj ili estis
Ja samaj, kiel ankaŭ li?

Ĉu li kapablis iel pensi
Dum krioj de nova kulpkonfesoj?
Ĉu povis li almenaŭ senti
Absurdon de la juĝprocesoj?

Kiel post ĉiu labortago
Li devis farti? Ĉu la koroj
Konscie de la monstra ago
Ne kunpremiĝis je doloroj?

Ĉu sin mortigi li ne emis
Por malaperi el la vivoj,
Kiu la homon tretis-premis
Por la Tirana sangsoifoj?

Dum furiozo de danĝero
En boloj de la arestmanoj
Ĉu li konjektis pri la vero:
Hodiaŭ vi, sed morgaŭ – mi?

Klara Ilutoviĉ

KOTIZOJ de REU por 2018

Laŭ Decido de la Estraro de REU de 25.10.2017

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon <http://reu.ru/aligho/eo> kaj pagi koncernan membran kotizon.

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KSSĜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo - 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus danka mencio en la Bulteno kaj en la asocia retejo reu.ru.

4. Kolektiva kotizo - 200 rubloj por ĉiu aliĝinta membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aliĝitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aliĝitaj membroj dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, ĉe unu abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aliĝitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta "amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian ekzistantan retadreson.

PAGMANIEROJ

1. Per Sberbank. Al la banka karto **5469 3800 7074 4643**. Tion eblas fari senpere en bankoficejo, per Sberbank-Online, per bankaŭtomato kaj terminalo. <http://sberbank-sbrf.ru/karta-sberbanka/kak-perevesti-dengi-na-kartu-sberbanka-rossii.html>

2. Per Yandeks-Denjĝi povas pagi al la monujo **41001363815184**, pagmanierojn vidu: <http://money.yandex.ru/prepaid/>

3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas persone en Moskvo.

4. Per UEA-konto reua-p (precipe por eŭraj kotizoj).

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas** retroŝte aŭ telefone **informi pri via pago** la kasiston (Aleksandr Lebedev, amikko@yandex.ru, telefonnumero 89853852181). Vi devas informi pri ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO” (REU)**

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 10.11.2017